



Novjorka Prismo

Numero 102

Marto 2001

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia marta kunveno

DATO: Vendredon, la 16-an de marto 2001, 6:30 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
(check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj

7:00 – **Kiel skribi Esperante – De la mantajpilo ĝis la komputilo.**
Prelego de Arnold Victor, kiu traktos la diversajn metodojn montri la ĉapelitajn literojn de Esperanto, emfazante la feliĉan nunan situacion. ★

Protokolo de la kunveno de la 16-a de februaro

La februara kunveno estis libro-aŭkcio kaj okazis en la konstruaĵo de UFT ĉe 48 East 21st Street. 16 homoj ĉeestis, inkluzive unu gastinon, Ana DEFERRARI. Ankaŭ du malnovaj membroj revenis post longa foresto. Tomaso ECCARDT, la prezidanto, bonvenigis ĉiujn kaj demandis ĉu la lastaj du protokoloj estos akceptataj. Rochelle F. GROSSMAN havis korektaĵojn pri la literumado de Armin DONEIS, kaj pri la nombro da ĉeestantoj ĉe la lastaj du kunvenoj: devus esti 14 en januaro kaj 35 en decembro, spite la ciferojn en la protokoloj. Ŝi plendis, ke ofte estas misliterumaĵoj ĉe personaj nomoj en *Novjorka Prismo*.

Tomaso anoncis, ke li ferios en Eŭropo dum la monato de marto, do li igos iun anstataŭe prezidi dum la venonta klubkunveno. Li ankaŭ anoncis, ke li ĵus finis sian teatraĵon, *Vitra tramo sur varmega lada tegmento* kaj li bezonas aktorojn por helpi prezenti ĝin. Rochelle anoncis, ke la klubo ricevis poŝtkarton de Arnoldo VICTOR sendata de Kenjo. Ŝi ankaŭ ĉirkaŭen-pasigis amuzan bildstrion de la sesdekaj jaroj, kiu menciis Esperanton. Oni ricevis ĝin de Stanley Drake. Pam LIEBER anoncis, ke ŝi havas malnovajn revuojn por disdoni al la klubanoj, ke ŝi donacos libron de Marjorie Boulton por la aŭkcio, kaj ke ŝi havas

konatulinon, kiu faras stampojn laŭ mendo. Tiu virino ofte faras stampojn kun Esperantaĵoj, kaj ŝi estas trovebla en la Interreto pere de la ĉef-vortoj "Lost Angeles". Alex Karkovsky anoncis, ke li estas membro de la plej bone konata oratora klubo Toastmasters, kaj li kuraĝigas aliĝi tiujn, kiuj estas parolemaj. Ilia adreso estas 1301 Avenue of the Americas.

Oni ankaŭ iomete diskutis pri la demando ĉu ni ŝanĝu la daton de la klubkunveno. Ŝajnas, ke la ĝenerala konsento estis, ke ni povus movi ĝin al la dua vendredo de ĉiu monato, anstataŭ la tria, laŭ la peto de du klubanoj. Bedaŭrinde ni devos atendi ĝis septembro por ŝanĝi ŝanĝo, ĉar estas tiam, kiam Rochelle petas de nia gastiganto, UFT, datojn por la tuta jaro.

Post la anoncoj, komenciĝis aŭkcio. La libroj venis el la kolekto de nia karmemora klubano Julius MANSON. Oni konsentis, per voĉdonado, ke ni faros ofertojn laŭ intervaloj de duondolaro. Ĉiuj la 48 libroj forvendiĝis, kaj la klubo gajnis \$145. Do, la meza prezo estis pli malpli 3 dolaroj.

Bedaŭrinde, ne estis tempo por la anoncita prelegeto de Lillian Rachele (pri Elderhostels), do ĝi okazos en aprilo kun la teatraĵo de Tom. Post la kunveno, kelkaj klubanoj iris al My Cousin Vinny's por babilo denove. ★

Protokolis: Tomaso ECCARDT

Sony Plaza

Pro timo de neĝoŝturmio, nur 6 personoj ĉeestis (Ulrich Becker, Marta L. Bergonzoli, Rochelle F. Grossman, Thomas Leong, Laura Miller, kaj Arnold Victor). Oni diskutis pri novaj mesaĝoj en la Interreto, la martan kunvenon de ESNY (nia prezidanto Tom Eccardt estos en Eŭropo), TAKE (la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto) en la urbo Meksiko, ktp. ★

– R.F.G.

DUES ARE DUE FOR 2001

Ĉu vi jam pagis vian kotizon?

Because of high copying and postage costs, we will once again be reviewing and reducing our mailing list. If there is a green X on your label (or in this box ☐) and we do not hear from you by March 31, we will assume that you no longer wish to receive our mailings and we will remove your name from our list.

Membership dues (\$15) support the mailing, meeting, and other costs of our local Esperanto movement.

Subscriptions (\$7.50) cover Prismo costs. (Subscriptions are free to U.S. Esperanto clubs and organizations but we encourage you to contact us so that we can better maintain our mailing list.)

We do not want to remove anyone who wishes to remain on our list. Please complete and return the enclosed form or otherwise contact us by March 31. Dankon! ★



Kapricaĵoj de Esperanto

Kiel Esperanto estas pli regula kaj malpliregula ol ni opinias

Dum miaj dek kvar jaroj kiel esperantisto, mi rimarkis kelkajn faktojn pri nia kara lingvo, kiuj neniam aŭ malofte estas menciitaj en lernolibroj. Eble vi ankaŭ trovis aferojn, kiujn "via patrino neniam instruis al vi". Mi opinias, ke jam estas tempo publikigi kelkajn. Tiu ĉi artikolo eble ŝajnos iom polemike, sed mi petas, ke vi legu ĝin laŭ la vidpunkto en kio ĝi estas skribata, kiel omaĝo al lingvo, kiu certe estas pli profunda kaj malsupra ol 16 reguloj povas indiki.

Eble vi ankaŭ trovis aferojn, kiujn "via patrino neniam instruis al vi".

Antaŭ ĉio, mi devas klarigi kelkajn terminojn kaj lingvistikajn faktojn kaj definojn. Unue, "morfemo" estas lingvistika unuo eble plej grava ol "vorto". Ĝi reprezentas la malpli longa serio da sonoj kun signifo, ĉu gramatika, ĉu leksika. Ekzemple, *guidlibroj*, kvankam ĝi estas unu vorto, enhavas kvar fonemojn: *guid-libr-o-j*. Evidente, neniu vorto en Esperanto estas unu-sona (aŭ unu-litera), sed kelkaj morfemoj ja estas unu-sonaj.

Due, en Esperanto, ĉiu vorto kaj radikoj esence apartenas al nur unu vortospeco. Interjekcioj, prepozicioj, konjunkcioj, subjunkcioj, ktp. estas evidentaj, ĉar ili neniam ŝanĝiĝas, kaj malofte ili havas finaĵojn. Foje oni aldonas -e al prepozicioj kaj kreas adverbojn: *kun* > *kune*. Rimarku, ke la pura radikoj restas prepozicio. Precipe unu-silabaj adverboj ne havas finaĵojn: *tuj*, *ĵus*, *jam*, *plu*, *ja*. Aliaj adverboj formiĝas de adjektivoj: *rapida* > *rapide*, *bela* > *bele*, ktp. Sed la radikoj *rapid-* kaj *bel-* estas esence adjektivoj, kaj nur iĝas adverboj pere de -e. Krome, aliaj radikoj estas aŭ substantivoj aŭ verboj: ekzemple *libr-*, *martel-*, *brus-*, estas esence substantivoj, kaj *kur-*, *komb-*, *ŝovel-* estas esence verboj. Pro tio, por signifi objektojn, oni diras *kombilo*, kaj *ŝovelilo*, sed *martelo* kaj *bruso*. Por pri detala klarigo, vidu J.C. Wells, *Teach*

Yourself Esperanto Dictionary, paĝoj 7-8. Estis Rene de Saussure, frato de la fondinto de moderna lingvistiko, kiu malkovris la fakton, ke ĉiu radikoj havas esencan vorto-specon. Kaj kun tio malkovro, li klarigis, ke la vort-formado en Esperanto estas multe pli facila kaj regula ol oni opiniis, kaj la reformoj de Ido ne estas necesaj.

La aliaj fontoj, kiujn mi uzis por tiu ĉi artikolo estas M.C. Butler, *Step by Step in Esperanto*; Kalocsay kaj Waringhien, *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*; kaj G. Waringhien, *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*.

Nu, la plej malalta nivelo de iu ajn lingvo estas fonologio. En Esperanto, ni lernas, ĉiu sono estas reprezentata de nur unu litero, kaj ĉiu litero reprezentas nur unu sonon. Plue, Esperanto ne havas duoblajn literojn aŭ duoblajn sonojn. Kompreneble, se du radikoj estas kunmetitaj, kaj la unua finiĝas per la sama sono, kiu komencas la duan, duobla litero rezultas: *dom+mastrino* > *dommastrino*. Precize la samo okazas en la angla: komparu la prononcojn de la "kk" kun tio de la "k" en *bookkeeping* kaj *beekeeping*. Teorie, tamen, en ambaŭ lingvoj, duoblaj literoj neniam aperas interne de morfemo, nur inter radikoj. Komparu tion kun la veraj duoblaj literoj de la itala: *anno* "jaro" kontraŭ *ano* "anuso". En Esperanto estas unu sola escepto de la regulo: *finno*. Duobla "n" aperas en tiu vorto por distingi ĝin de *fino*. Eble iun tagon, finnoj postulos la anstataŭigon de *finno* per *suomo*, pli simila al la indiĝena vorto. Sed ĝis tiu tempo, parolantoj de Esperanto devos lerni kiel prononci duoblan "n" interne de morfemo, kaj Esperanto restos iomete malpli regula ol ni opinias.

Eble vi aŭdis pri la regulo de vortfarado en Esperanto: kombinu radikojn, kaj aldonu gramatikan finaĵon: *skrib-maŝin-o*, *ban-ĉambro-o*, *sat-manĝ-i*. Eble vi ankaŭ aŭdis la regulon, ke se tri konsonantoj kuniĝas, intermetu belsonecan vokalon "o": *urbOdomo* (ne *uRBDDomo*), *dormOĉambro* (ne

doRMĈambro), *servOsoldato* (ne *seRVSol-dato*). Tamen, de kie venas la aliaj konsonantoj "a", "i", kaj "e" en *ĝustAtempe*, *pagldeva*, kaj *multEkosta*? Unu teorio klarigas vortfaradon inverse: la vokalo malaperas, se tri konsonantoj ne kuniĝas. Ne nur "o" malaperas, sed iu ajn vokalo, kiu indikas la vortospecon de la radikoj. Do kiam estus tri sinsekvaj konsonantoj, ni vidas la ne-malaperintan vokalon en *ĝustAtempe* kaj *pagldeva*. Sed kiel klarigi la "e" en *multEkosta*? Ni scias, ke *mult-* estas esence adjektiva, ĉar ne ekzistas esence adverba radikoj, kiu finiĝas per -e; nur la sendependaj radikoj kiel *tuj* estas esence adverba. Ĉu eble *multEkosta* konsistas el derivita adverbo *multe plus kosta*? Se tio estus vera, oni devus klarigi kial *multEkostA* bezonas esprimi vortospecon du fojojn. Ĉu *multkosta* aŭ *multOkosta* estus gramatike aŭ semantike malklara? Kio estas la fonetika malsameco inter ĝi *multe kosta* kaj ĝi *multekosta*? Inverse, oni devus klarigi kial oni diras *dormOĉambro*, kaj ne *dormĈambro*. Ĉu *dormOĉambro* estas ĉambro "por dormo" kaj ne "por dormi"? Mi supozas, ke vortfarado (vortOfarado?) estas iom ĥaosa, ĉar Zamenhof ne klarigis ĝin en la dek ses reguloj.

Mi supozas, ke vortfarado estas iom ĥaosa, ĉar Zamenhof ne klarigis ĝin en la dek ses reguloj.

Foje, Esperanto estas pli regula ol ni opinias. Ĉu vi iam rimarkis, ke multaj vortoj finiĝas per -aŭ, ekzemple *ambaŭ*, *adiaŭ*, *kontraŭ*, *kvazaŭ* kaj *baldaŭ*? Ĉiuj tiuj vortoj ne estas radikoj kun implicita vortospeco, kiel *vort/o*, *manĝ/i*, kaj *bel/a*, ili estas aŭ pronomoj, interjekcioj, prepozicioj, subjunkcioj aŭ adverboj, repektive. Tamen preskaŭ ĉiuj akceptas vortospecan finaĵon: *adiaŭi*, *kontraŭulo*, *kvazaŭa*, *baldaŭa*. Ĉiuj tiaj vortoj devenas aŭ de la latina: *ambaŭ* < *ambo*, *ĉirkaŭ* < *circa*, *kontraŭ* < *contra*, *antaŭ* < *ante*, *hodiaŭ* <

hodie; aŭ de la itala: *adiaŭ* < *addio*, *ankaŭ* < *anche*, *almenaŭ* < *almeno*, *apenaŭ* < *appena*, *ankoraŭ* < *ancora*; aŭ de la franca: *malgraŭ* < *malgré*, *hieraŭ* < *hier*, *preskaŭ* < *presque*; aŭ de la germana: *anstataŭ* < *anstatt*, *morgaŭ* < *morgen*, *baldaŭ* < *bald*. La kaŝita regulo ŝajnas esti: se Zamenhof volis pruntepreni vorton de la supre nomitaj lingvoj, kiu ne estis substantivo, verbo aŭ adjektivo, kaj se la vorto estis plur-silaba (aŭ la Esperanta versio devis esti plur-silaba), kaj la vorto devis finiĝi per vokalo, li uzis -aŭ, anstataŭ ol la "a", "e", "i", "o" aŭ "u", kiuj jam havis gramatikan signifon.

Estas bone konataj la vorto-ludoj produktataj de la falsa analizado de unu morfemo en plurajn morfemojn: *amuzi* > *am-uz-i*, *eleganta* > *el-eg-ant-a*. Krom tiuj, supozeble Esperanto ne havas homonimojn. Sed de la vidpunkto de aliaj lingvoj Esperanto ja havas homonimojn. Ekzemple, *pura* havas du signifojn de la vidpunkto de la angla: "clean" kaj "pure". Ankaŭ *formo* signifas kaj "form" kaj "shape"; *ĉielo* signifas "sky" kaj "heaven". Sed de la vidpunkto de la germana aŭ la hispana, ne ĉiuj estas homonimoj. Se oni rigardas morfemojn, tamen, ankaŭ estas homonimoj interne de Esperanto. Ekzemple -i- havas plurajn signifojn: ĝi estas indikilo de infinitivo: *parol-i*; indikilo de la pasinta verbo-tempo: *vid-i-s*, *vid-i-ta*, *vid-i-nta*, indikilo de korelativo: *k-i-o*, *t-i-e*, *ĉ-i-a*; kaj indikilo de pronomo: *m-i*, *v-i*, *il-i-a*. Ĉu vi povas elpensi la du signifojn de -n-, -o- kaj -a-? Fine, la -n- de la akuzativo havas plurajn uzojn aŭ signifojn, laŭ kelkaj lingvistoj; tiuj povas esti konsiderataj kiel homonimoj. Mi parolos plu pri tio sube.

La semantiko (signifoj) en Esperanto estas multe pli regula ol en evoluigintaj lingvoj. Tamen foje estas "truoj" en tiu reguleco. Ekzemple, kial ni diras *nun*, anstataŭ *ĉi-tiam*? Tio estas la sola anstataŭigo de la kunmetitaj korelativoj per unu sola morfemo. Kvankam *ĉi-tial* kaj *tial* similas al *ĉar*, ili ne signifas precize la saman. Alia "truo" en la semantiko de Esperanto estas la maloj. Teorie, for-

gesi, perdi kaj morti ne estas necesaj, ĉar oni povus diri malmemori, maltrovi kaj malvivi. Aliaj maloj, kiel kun / sen, igi / iĝi, eta / ega, jes / ne, kvankam ili teorie ne estas necesaj, la aldono de mal- eble tro plilongigus gramatikan morfemon.

... naturo malamamis vakuon, malordo devis cedi al ordo

Lernanto de Esperanto kutime trovas du morfemojn "sen defina signifo," nome, -um- kaj je. "Uzu je kiam vi bezonas prepozicion, sed neniu alia prepozicio funkcias;" "-um- ne havas difinan signifon, sed ĝi formas rilatajn vortojn, kies signifojn venas el la kutimo..." diras la gramatikoj. Interese, kutimo ŝajne donis difinan signifon al tiuj du morfemoj.

Eble vi jam rimarkis, ke je estas uzata por indiki tempon: *je la sesa matene*, *je la unua de majo*, *je Pasko*. Ĝi ankaŭ mezuras: *pli alta je du milimetroj*, kaj ĝi indikas la substancon mezuratan: *plena je ĝojo*. Iasence, tiuj du signifoj estas rilataj, kvankam ne precize samaj. Restas nur kelkaj ne rilateblaj uzoj de je: *kredi je Dio*, *stari je ies dispozo*, ktp. Butler kredas, ke je ankaŭ povas anstataŭigi la akuzativon por indiki objekton: *mi manĝas je pomo* = *mi manĝas pomon*.

Kiel verbo, -um- indikas la aplikadon aŭ uzon de la substantivo, kiun ĝi verbigas: *aerumi*, *akvumi*, *sapumi*, kaj eĉ: *cerbumi*, *brakumi*, *butonumi*. Kiel substantivo, -um- signifas vestaĵon aŭ kovraĵon uzata apud la afero, kiun indikas la radikoj: *buŝumo*, *kolumo*, *manumo*, *pakumo*. Fakte, ne restas multe da esceptoj al tiuj du uzoj de -um-. Do, ŝajnas, ke rilate al -um- kaj je, naturo malamamis vakuon, malordo devis cedi al ordo, kaj Esperanto iĝis pli regula ol ni opiniis.

Laste, mi devas mencii la plurajn uzojn de la akuzativo. Krom por rekta objekto, oni uzas la akuzativon por indiki "movado al": *mi iris en la*

ĉambron. Sed laŭ kelkaj lingvistoj, tiu uzo estas nura anstataŭigo de markanta al aŭ ĝis: *mi iris al en la ĉambro*. Pro tio, oni neniam uzas la akuzativon kun al aŭ ĝis. Oni uzas la akuzativon ankaŭ por indiki tempon aŭ mezuron: *mi iris lundon*; *mi piediris unu mejlon*. Mirakle, tiuj lastaj du uzoj korespondas al du el la uzoj de je. Krome, se oni akceptas *mi manĝas je pomo*, oni povas diri, ke la akuzativo simple estas anstataŭigo de al, ĝis, kaj je. Do la akuzativo ne havas plurajn uzojn, ĝi simple estas anstataŭigo de tri prepozicioj.

Resume, Esperanto estas samtempe pli komplika kaj malpli komplika ol ni kutime opinias. Kion tio signifas? Ĉu Esperanto estas pli bona kaj malpli bona ol ni opiniis? Kompreneble la komplikaj (kaj simpligaj!) estas malmultaj. Krome, mi opinias, ju pli tio malvalidigas la argumenton de simpleco favore al Esperanto, despli ĝi malvalidigas la argumenton de malnatureco kontraŭ Esperanto. Se Esperanto estas iom komplika, ĝi similas al la evoluintaj lingvoj. Eble pro tio Esperanto estas uzebla. ★

— Tomaso ECCARDT

Ĉu la dua vendredo?

Kelkaj klubanoj plendis, ke la kutima tria vendredo de ĉiu monato ne estas oportuna por klubkunvenoj. Do mi petis sugestojn ĉe Sony Plaza kaj ĉe la februara kunveno por pli oportuna tago. La ĝenerala konsento estas, ke vendredo estas la plej oportuna tago de la semajno, sed oni povus movi la klubkunvenon al alia vendredo. Kion vi opinias? Ĉu ni ankaŭ movu la neformalan kunvenon ĉe Sony Plaza de la unua dimanĉo al la lasta dimanĉo?



Bonvolu telefoni min ĉe 212-477-6516 se vi havas komenton. Rimarku, ke UFT ne permesos tagojn de la semajnfino. Neniu ajn ŝanĝo okazos antaŭ ol septembro. ★

— Tomaso ECCARDT

Kion vi faros dum via (somera) ferio?

Jen kelkaj eblecoj. Pli da informo troviĝas ĉe la sub-indikitaj TTT-paĝa aŭ e-poŝta adresoj. — J.M.

5^a Tut Amerika Kongreso de Esperanto

Meksikurbo, 15-21 aprilo 2001

"Kial estos speciala la 5-a TAKE?

- Fama Meksika festa spirito!
- Tagmanĝo apud azteka lagbordo!
- Bankedo sur dekkvina etagxo kun belega nokta panoramo!
- Imponaj piramidoj supre sur kiuj ni kantos *La Esperon!*
- La plej dika arbo de la mondo!
- La plej granda antropologia kolekto de la mondo!
- Prezento de kvar novaj libroj!
- Eminentuloj de pluraj landoj: Johano Bachrich, Mark Fettes, Jorge Luis Gutierrez, Michela Lipari, Bill Maxey, Hugo Mora, Atilio Orellana, James Resende Piton kaj aliaj!

Plus muziko, teatraĵoj, kaj diversaj aliaj surprizoj!"

www.punto-y-aparte.com/esperanto

49-a Jarkongreso de ELNA

Salt Lake City, Utah, 25-28 majo 2001

"Dum la kongreso estos kompreneble multaj prelegoj, vidindaĵoj, kaj amuzaĵoj... kaj tempo por babilado."

elna@esperanto-usa.org

86-a Universala

Kongreso de Esperanto

Zagrebo, 21-28 julio 2001

Kulturo de dialogoj—dialogo inter kulturoj

"Ni elkore invitas vin al Zagreb.

Spertu Esperantuĵon en la jaro 2001, en la urbo kie Esperanto bone fartas."

UEA: uea@inter.nl.net

LKK: esperanto@zg.tel.hr

pubwww.srce.hr/esperanto-kel/ukzagreb.htm

UEA/NY

La 21-an de februaro mi ĉeestis diskuton pri *Human Rights Education: The Convention on the Rights of the Child* ĉe UN, konvokita de la Internacia NRO Komitato pri Homrajtoj. La diskutantoj estis Sheldon SHAEFFER (Unicef), Jo BECKER (Human Rights Watch), kaj Miriam LYONS (konsultanto pri homrajtoj). S-ro Shaeffer prezentis tre interesan proponon pri lernejoj, kiuj respektas la rajtojn de infanoj kaj kiuj estas amikecaj al infanoj.

La 28-an de februaro kaj la 1-an de marto mi reprezentis UEA-n kiel observanto ĉe la estrarkunsido de Congo (Conference of NGOs) ĉe 777 UN Plaza. Tiel impresis min la granda kaj grava laboro de Congo kaj la amplekso da temoj, kiujn oni traktis. Oni diskutis pri la rilatoj inter UN kaj la NROj (neregistaraj organizaĵoj). Poste oni parolis pri la diversaj konferencoj kaj kunvenoj de UN, kiuj okazos dum la periodo 2001-02 kaj kiel Congo povus kontribui aŭ helpi. Kompreneble oni ankaŭ diskutis pri multaj administraj kaj financaj aferoj. ★

— Rochelle F. GROSSMAN

.....

North American

Summer Esperanto Workshop

University of San Francisco

2-13 julio 2001

"This year, the... Workshop will take place in a new, sunnier location, right in the center of the city... Our two-week program of intense study offers unique opportunities to improve your Esperanto while having fun. We of-



Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron:

Marto

16

Kiel skribi Esperante
Prelego de Arnold Victor
Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

Free Esperanto classes continue
at the Stuyvesant Adult Center
Mondays, 7:30-9:00 pm, thru 4/30

Aprilo

1

Tagmanĝo
Dimanĉon, 1:00 pm ĉe SONY Plaza
LIMDATO POR KONTRIBUAĴOJ POR PRISMO 103

20

ESNY Kunveno
Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC (20th/21st Streets)
(check schedule in lobby for room number)

SONY Plaza Atrium
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

Stuyvesant Adult Education Center
345 East 15th Street (1st/2nd Avenues) NYC
Fourth floor, room 411

fer these two class levels: *Gaining Confidence in Esperanto* (advanced beginner/intermediate) and *Audio-Visual Methods of Teaching and Learning Esperanto* (advanced). The three instructors will be Duncan Charters, Derek Roff, and Grant Goodall. Additional activities will be offered and scholarships are available.

eddyellen@aol.com

★

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017

(212) 687-7041

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Stuart Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Izong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(718) 671-5699

Program-Direktoro
Susan Kohn
(212) 226-0443

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@aol.com

© 2001 Esperanto Society of New York

Novjorka Prismo

Numero 102 — Marto 2001

ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>